

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Orgaan van de VLAAMSE ESPERANTISTENBOND, St. Klaradreef 59, BRUGGE

Postrekening 2321.50 van V. E. B. Raapstr. 74, Gent

Verschijnt maandelijks

Drie en twintigste jaarg.

Nummer 5 (260)

MEI 1956

LIDMAATSCHAPSGELDEN:

Leden: 100 F (met inbegrip van het bondsorgaan)

Steunleden: 150 F (idem)

Inwonende leden: 25 F (met inbegrip van „De Esperantist”)

Jongeren (onder de 21 jaar): 50 F

ABONNEMENTEN:

België: 75 fr.

Ceteraj landoj: 75 bfr.

Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

Mallonga Historia Skizo pri la urbo GENT

(sekvo)

Moderna Epoko: revekiĝo

1780—90 regis la Aŭstria imperiestro Jozefo II-a kiu abrupte aliigis ĉiujn instituciojn. Ondegoj da protestoj envenis el ĉiuj direktoj. Ofte okazas ke ŝajne malgravaj detaloj forte influas iun evoluon. 1788—89 la vintro estis ege severa kaj la rikolto komplete malsukcesis tiel ke ekz. en Gent el 50.000 enloĝantoj estis 12.000 senhavuloj. Kiam okazis la tutlanda ribelo, la tamen multnombraj Aŭstriaĵ soldatoj en Gent tutsimple submetiĝis. Sed jam en decembro de la sama jaro 1790 Aŭstrio ree regis super nia lando. En '92 estis la vico de la Francoj. 22 feb. '93 la aneksiĝo de nia lando ĉe Francujo estis voĉdonata dum tiel nomata popolkunveno en la Sankta Bavopreĝejo. Cetera la preĝejoj fariĝis „temploj de la Racio” aŭ ili estis detruataj kiel okazis kun Sta. Veerle, Nia Sinjorino kaj Sta. Petro en Gent. Post ankoraŭfoja mallonga Aŭstria regado, la Francoj definitive venis en '94 (t.e. por la daŭro de 20 jaroj).

Sub la diktatora reĝimo de Napoleono (ek de '99) komenciĝis la ekonomia revekiĝo. Dank' al la Gentano Lieven Bauwens, kiu kaŝe kaj kun mortdangero alportis el Anglujo la mekanikan kotonŝpinilon, Gent iĝis industri-urbo. Ne nur la tro multnombra enloĝantaro ekhavis laboron, sed ankaŭ multaj el la ĉirkaŭaĵoj venis al Gent. 1807 estis jam 10.000 tekstlaboristoj en tiu urbo kiu iĝis la tria industri-urbo en Francujo post Lyon kaj Rouen. Do oni ekhavis laboron kaj sekve panon. Restis la fakto ke la laboristaro vivis en mizeraj kondiĉoj pro malaltega salajro. Cetera la plimulto estis virinoj kaj infanoj. Asocioj ankoraŭ ne ekzistis. Kaj tiu grandindustrio mem falis pro la ekonomiaj decidoj de Napoleono.

1815 estis starigata la Reĝlando de la Nederlando. Kion ĝi alportos? La tuta granda Francujo estis ja la vendregiono de la Genta industrio. Feliĉe la regado de reĝo Vilhelmo estis ekzemple bona. Nun la interesega Indo-

nezio iĝis la vendregiono. Kotono venis nun el Ameriko. De 1815 ĝis 1827 oni laboris pri la kanalo al Terneuzen. Per tiu tre grava entrepreno, la distanco Gent-marĉo kiu estis antaŭe 170 Km. mallongiĝis ĝis nur 55 Km. 1817 la reĝo kreis universitaton en la Flandra ĉefurbo. Per tiuj kaj aliaj faktoroj la enloĝantaro kiu estis 62.000 en 1815 kreskis ĝis 80 mil en 1830. Sed unu tre nigra makulo restis: la ege mizeraj kondiĉoj en kiuj la laboristaro vivis kaj laboris. Cetera, tiu stato estis la sama ĉie. Tio klarigas ke la laboristaro estis ofte revoluciema. 1830 estis la jaro de multaj revolucioj iom ĉie en Eŭropo. Ankaŭ en Belgujo. Tiu epoko, tiel proksima de ni, ankoraŭ ne estas tute klara al ni. Internacia konferenco en Londono en 1830 (20 Dec.) proklamis la sendependecon de la sudaj nederlandoj. Sed ĝis 1839 en kiu jaro la Holanda reĝo cedis Belgion, estis multe da civilmilito en Gent... kaj kompreneble ekonomia mizerigo. Tamen, ankaŭ nun venis revekiĝo. Alia industrio, de la tolajoj, iĝis nun fabrikindustrio kaj multe vastiĝis. El tiu tempo datumas la ankoraŭ ekzistantaj „La Liniere Gantoise” kaj „La Lys” (ambaŭ ekestis en 1838).

La novinventita fervojo ankaŭ multe helpis al industrio kaj komerco. La Genta stacidomo estis konstruata en 1837 por la fervojo al Mechelen. En la posta jaro oni organizis la linion al Brugge. En tiu tempo alia regiono iĝis unu el la ĉefindustriregionoj de la tuta mondo: Nord-Francujo. Nu Gent estis la trairhaveno por tiu industrio. Sed kiam venos pli bona situacio por la laboristoj? Personoj kiuj ne kapablis doni necesajn zorgojn kaj nutraĵojn al infanoj formetis ilin sur izolitaj lokoj en la espero ke riĉuloj trovos kaj kompatos ilin. Ankoraŭ en 1841 Gent nombris 618 da tiaj troviĵoj. Estis en la dua duono de tiu jarcento ke la laboristoj organizis vastan socian movadon. En Gent estis famaj la grandegaj strikoj de 1857, '59 kaj '61. En 1881 starigis la kooperativa bake-

BENELUKSA ESPERANTO - KONGRESO - GENT

Lasta Alvoko de la L.K.K.

La eventualaj partoprenontoj pagu kiel eble plej baldaŭ kotizon kaj mendu loĝadon, kiu havigas egan malfacilaĵojn. Ni ne plu povas certigi pri iu prezo.

jo „Vooruit” (antaŭen). De 1900 datumas en Gent la unua kaso por senlaboruloj, kiu ŝajne estis la unua en la mondo. En la daŭro de unu jarcento, la vivkondiĉoj por la laboristaro nekredinde pliboniĝis.

Pro tio kaj ankaŭ pro la progresego de la kuracado, ĉie la loĝantaro kreskis. En tiu dua duono de la 18a jarcento, Gent ekhavis 6 novajn paroĥojn; inter ili mi citas: Sta Petro-Aalst de '56; Sta Bap. '59; Sta Joz. '75; Sta Antonio '96. Tiel Gent mem atingis la ciferon de 170 mil enloĝantoj; kun la antaŭurboj: 215 mil.

Oni kompreneble ne kapablas profeti pri la estonteco. Sed verŝajne Gent estas bone ekipita por la venontaj jardekoj. Laŭ akvo ĝi havas interligon kaj kun Orient-Eŭropo kaj kun la Mediteranea maro. La haveno havas surfacon de 1.288 Ha. kaj 10,5 Km. da kajoj. Germanaj kaj Anglaj karboj por Nord-Francujo kaj Parizo estas ankoraŭ nun importataj laŭ Gent.

Sed Gent estas ne nur ekonomie interese urbo; ĝi estas ankaŭ vidinda, admirinda. El ĝia riĉega pasinteco ĝi konservis multegajn atestejojn. Ne sole konstruaĵoj kiel la grafa kastelego kaj la Byloke-muzeo, sed tutaj stratoj.

Ĝi estas ne malpli riĉa ol Brugge. Estas vere ke la industria revolucio de la antaŭa jarcento tre aliformigis la urbon; dum en tiu tempo Brugge dormis. Tio faras ke Brugge konservis belegajn kadron kaj atmosferon de pasintaj jarcentoj; dum en Gent tiuj historiaj trezoroj estas pli kaŝitaj malantaŭ la modernaj konstruaĵoj kaj domblokoj. Sed atentaj promenadoj en Gent malkovros al vi belegan, admirindan mondon.

Drs. F. Roose, Brugge

(fino)

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ

		gld.	fr.
<i>Palaco de Danĝero (Wagnalls)</i>	bind.	3.50	56.—
<i>(Romano pri la vivo de S-ino Pompadour)</i>			
<i>Pro Iŝtar (Luyken)</i>	„	4.50	72.—
<i>Ĉe la Sanktaj Akvoj (de Heer)</i>	„	6.75	90.—
<i>La Granda Aventuro (Szilagyi)</i>	„	5.50	80.—
<i>Hungara Antologio</i>		8.50	200.—
<i>Sur sanga tero (Baghy)</i>		4.50	70.—
<i>Strato de l' fiŝanta kato (Földes)</i>		4.50	
<i>Argenta Duopo (Baghy-Kalocsay)</i>		2.50	
<i>Fundameta Krestomatia</i>	bind.	10.50	140.—
	broŝ.		88.—
<i>Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj</i>	bind.	7.60	110.—
<i>Bibliografio de Tito</i>	„	10.50	150.—
<i>Jus aperis :</i>			
<i>Tartarin de Taraskono (Daudet)</i>	tole „	6.60	99.—
<i>Sinjoro Tadeo (Mickiewicz)</i>	„ „	6.—	
<i>Por la studo :</i>			
<i>Honderd vragen over grammatica en onderwijs</i>		0.75	11.—
<i>La konsilanto (Degenkamp)</i>	kartonita	3.60	53.—
<i>Leidraad Esperanto Literatuur (Degenkamp)</i>		0.75	11.—
<i>Post la kurso (de Bruin en Faulhaber)</i>		3.—	45.—
<i>Gebonden Stijl (Faulhaber)</i>		0.75	11.—
<i>Eigennamen in Esperanto (Degenkamp)</i>		0.75	11.—
<i>Tra la Labirinto de la gramatiko (Faulhaber)</i>		9.75	140.—
<i>Esperanto Leerboekjes voor de lagere school (Appel)</i>			
	Deel I en II, per deel	1.50	24.—
<i>Methodisch Leerboek (Dirksen)</i>		1.50	24.—
<i>Gramofondisko kun salutparoloj de la Universala</i>			
<i>Kongreso de Esperanto, Bologna 1955. 175 m/m.</i>			
	Nerompebla. 45 RPM.	5.—	

MENDU ĈE:

Libro-servo LEEN, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O, Pĉk. 76915.
 Flandra Esperanto Instituto, Blankenbergse Steenweg 72, Brugge.
 Belga Esperanto Instituto, Oostenstraat 26, Antwerpen, Pĉk. 168958.
 La afranko estas pagata de la aĉetanto. la prezoj en bfr. enhavas la afrankon enlandan.

LA STUDANTO

Jen la ĝustaj prepozicioj de

Ekzerco 30 A:

1: en; pri. 2: kun; en; pri. 3: en. 4: pri (cerbumi = streĉi la cerbon por solvi problemojn); sur. 5: pri (ne: al!); el. 6: En (ankaŭ: ĉe); pri (ankaŭ: en). 7: el; sur. 8: al; en. 9: Post (ne: trans = aliflanke de; ĉi tiu prepozicio indikas lokon, „post” tempon); de; pro (ne: por, ĉar la danko estas por iu pro io!), kontraŭ. 10: pri; en.

Jen ekzemploj de kompletigoj de la frazoj de

Ekzerco 29 B:

1: Li tre ŝatis fruktojn, sed lia sentema stomako ne bone toleras ilin. 2: Li tre ŝatis ne nur fruktojn, sed ankaŭ legomojn. 3: Li ŝatis fruktojn, kvankam li ne kuraĝis konfesi tion. 5: Li ŝatis fruktojn kaj tial ofte konsumis ilin. 6: Li ŝatis nek fraŭlinojn (por iom ŝanĝi la temon!), nek sinjorinojn. 7: Des pli li ŝatis fraŭlinojn, ju pli ili rezistis al li. 8: Li ĉiam ŝatis fraŭlinojn, tiom pli kiam ili estas ne nur ĉarmaj, sed ankaŭ riĉaj. 9: Li ŝatas fraŭlinojn, kondiĉe ke ili estas afablaj al li. (Post „kondiĉe

ke” oni trovas kelkfoje volitivon (= u-modon), ankaŭ ĉe Zamenhof. Laŭ „Plena Gramatiko” tio ŝajnas neimitinda, ĉar tiajn prepoziciojn oni ĉiam povas transformi en „se”-prepoziciojn kaj en „se”-prepoziciojn tiaokaze nepre ne taŭgas volitivo; tial ne: „estu”, sed „estas!”). 10: Li tiom ŝatas fraŭlinojn, ke li facile implikiĝas en amo-reto.

Novaj Ekzercoj:

Ekzerco 31 A:

Tien, kie estas streketo, metu la ĝustan literon:

1: Sur la dua pa—o de la prospe—to estis indiko pri la pa—o de la kongreskotizo. 2: En la frua mateno brilis la suno en la ro—o sur la ro—oj. 3: Demandi ne plu tre junan fraŭlinon pri —ia a—o estas ne tre sa—a a—o. 4: —ian a—on tia fraŭlino ordinare preferas ka—i. 5: La knabo ma—is pe—on da pe—o. 6: Pa—o post pa—o ni progresos post pa—o de longa tempo. 7: La unuaj du monatoj estas la se—ono de la jaro kaj ili apartenas al la malvarma se—ono. 8: Post ka—o de la ka—o la ka—isto rifu—is pa—i —iajn —uldojn, pa—is —iajn kofrojn kaj rifu—is al la eksterlando. 9: Komen—o

bona estas laboro duona, diras sa—a proverbo. 10: La estro de la armea orkestro, kiu havis la rangon de ma—oro, preferis ludigi muzikon en ma—oro.

Ekzerco 30 B:

Tien, kie estas streketo, metu la ĝustaj(j)n litero(j)n:

1: S-ro Kongresemulo kaj —ia edzino intencas partopreni la kongreson en Gent. 2: S-ro K. kun —ia edzino jam ĉeestis plurajn kongresojn. 3: Ankaŭ en Utreĥto oni vidis lin kun —ia edzino. 4: S-ro K. kaj —ia edzino petis la kongressekretarion skribi —iajn nomojn sur la liston de gekongresanoj. 5: Fakte ĉiu el ni, kiuj nomas —in Esperantistoj, devus menci —ian nomon al la kongressekretario. 6: Vi, kiu ankoraŭ ne anoncis —in, memoru —iajn kongrespartojn kaj faru —ian decidon. 7: Vi eble trovas —ian kason ne sufiĉe plena kaj preferas tial pasigi la kongresajn tagojn en —ia hejmo. 8: Zamenhof diras en unu el —iaj proverboj: „—ia estas pli kara ol najbara”. 9: Ni, kiuj ŝatas dediĉi —ian atenton al —ia idealo, bone pripensu —ian devon. 10: Ekzistas alia ĝojo por la homo krom manĝi kaj trinki kaj igi —ian animon ĝui plezuron de —ia laborado, nome servi —iajn idealojn.

Ekzercojn korektotajn gelegantoj sendu (kun poŝtmarko por resendo) al la Kompilinto de la rubriko: S. S. de Jong Dzn, Waltweg 3, TJERKWERD bij BOLSWARD, Frislando, Nederlando.

Postkongresa Arango en Norvegujo

La landaj asocioj de Danujo, Norvegujo kaj Svedujo interkonsentis ke ĉiujare unu el ili aranĝu sian jarkunvenon ne dum Pentekosto, por ebligi al la membroj viziti kelkfoje ankaŭ la jarkunvenon aŭ kongreson de la najbaraj landoj, en la espero tiel plifortigi la kunlaboron. Ĉi-jare la vico venis al Norvegujo, kaj Norvega Esperantista Ligo decidis okazigi sian jarkunvenon en Oslo dimanĉon la 12an de Aŭgusto, do tuj post la kongreso en Kopenhago.

Estas la espero de la estraro de N. E.L. ke ankaŭ gesamideanoj ekster la Skandinaviaj landoj volos viziti la jarkunvenon kaj interŝanĝi kun ni spertojn kaj ideojn. Sed supozeble oni ne volas iri al Norvegujo nur por unu tago. Ni tial, interkonsente kun la L.K.K. en Kopenhago, starigis planojn pri kelktagaj ekskursoj tra Norvegujo, kiuj ekiros el Oslo lundon matene la 13an de Aŭgusto. (Pro bedaŭrinda okazajo tiuj planoj ne trovis lokon en la 2a Bulteno de la Kongreso). Tiuj ekskursoj trapasos plej pitoreskajn, parte almontarajn regionojn de Suda Norvegujo.

Interesigantoj povas ricevi ĉiujn detalojn ĉe: Postkongresa Ekskurso, Box 942, Oslo, Norvegujo.

C. Støp-Bowitz.

Unesko - Novajoj

Danĝeroj de atoma radiado diskutitaj de scienca grupo de U.N.

Dek kvin membroj de la scienca komitato de Unuigintaj Nacioj studis la efikojn de la atoma radiado je la homo, tute speciale koncerne la gradon, kiu povas esti konsiderata kiel sekura por la personoj laborantaj en atomaj laborejoj kaj manipulantaj radio-aktivajn materialojn. La sciencistoj estis nomitaj fare de Aŭstralio, Brazilo, Kanado, Egiptujo, Franclando, Japanujo, Svedlando, Sovet-Unio, Unuigita Reĝlando, Usono, Argentino, Belgujo, Ĉeĥoslovakio, Hindujo kaj Meksiko. La komitato preparas eldonon de ĉiujaraj raportoj pri siaj eltrovoj kaj prezentos ankaŭ al la Ĝenerala Asembleo de U.N. resumon de la raportoj, ricevataj de la registaroj, pri la efikoj de radiado je la homo.

Televideo utiligata en muziko

Televideo trovis novan aplikon en la Viena Ŝtata Opero, kiu estis remalfermita la pasintan novembro. Ĝi helpas la dirigenton de la ĥoro malantaŭ la scenejo ricevi la signojn de la dirigento de la orkestro. Kiel en multaj operejoj, la Viena opera ĥoro troviĝas malantaŭ la scenejo kaj estas nevidebla de la publiko. Tute malgranda televida kamero apud la orkestro reproduktas la movojn de la dirigento sur ekranon instalita malantaŭ la scenejo, kie la ĥormajstro kaj la kantan- toj sekvas ilin.

Fundamenta edukado por Pigmeoj

Specialaj grupoj da edukistoj en la Franca Kameruno larĝigis siajn aktivecojn al Pigmeaj triboj, kiuj loĝas en la arbaroj de la orienta parto de la lando.

En la pasinteco la Pigmeoj vivtenis sin ĉefe per kolektado de gumo sur arboj kaj de medicina planto nomata strophantus. Ĉar tiuj du produktoj malaltiĝis en sia valoro, la triboj komencis okupiĝi pri agrikulturo kaj nun ili vivas en pli alireblaj komunajoj. La francaj edukistoj prezentos filmojn pri ĉiutagaj problemoj, kiel ekzemple pri agrikulturo, sano, higieno k.t.p.

La UNESCO-Domo en Parizo estos finkonstruita en 1957

La Sekretariato de U.N.E.S.C.O. nun troviĝas en la t.n. Hôtel Majestic en Parizo. La nova konstruaĵo de U.N.E.S.C.O. havos Y-formon kaj konsistos el 7 etaĝoj. Ĝi havos 600 oficejojn por personaro de ĉ. 1.200, salonegon por kunvenoj de la Pleno, 7 ejoj por la komisionoj, restoracion, medicinan centron k.t.p. La alia konstruaĵo, kiu estos uzata por la konferencoj, povos enteni pli ol 2.000 personojn.

La Domo, kiun oni komencis konstrui en aprilo 1954, estos finita komence de 1957. La konstruaĵoj kostos

41-a Universala Kongreso de Esperanto

4 aŭgusto - 11 aŭgusto 1956

N-ro 6

OFICIALA KOMUNIKO

Aprilo 1956

ADRESO: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

BANKO: Handelsbanken, Kopenhago, Danlando.

POSTGIRKONTO: 41-a Univerala Kongreso de Esperanto, n-ro 97820, Kopenhago, Danlando.

NOVAJ FAKKUNVENOJ: Anoncis sin: Internacia Scienca Asocio Esperantista, ĉe Prof. B. Popović, Zagrebačka 18, Sarajevo, Jugoslavio.

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, ĉe A. Beckers, Kwaadmechelen, Limburgo, Belgujo.

Tutmondo Esperantista Ĵurnalista Asocio, ĉe A. Ribot, rue Vergnes 11, Marmande, Francujo.

La Esperanto-Spiritista-Societo, ĉe N. kaj H. Holmes, 38, Fillebrook Road, Leytonstone, E. 11., Anglujo.

Internacio de Militkontraŭuloj, ĉe Birchcroft, Pilgrims' Way, Harbledown, Canterbury, Anglujo.

LOĜEJOJ kaj EKSKURSOJ: Bonvolu atenti la instrukciojn en la Loĝiga Plano kaj en Ekskursi Programo. Lasta dato por akcepto de mendoj estas la 1-a de junio 1956.

ARTIKOLOJ: La esperantistoj estas denove invitataj sendi al la Kongreso gazeteltondajojn koncernantajn la 41-an Univeralan Kongreson de Esperanto.

INFANA KONGRESETO: Bonvolu anonci partoprenon antaŭ la 30-a de junio 1956 rekte al La Ludo-Cambro, Hartmannsvej 23, Kopenhago - Hellerup. Pri kondiĉoj vidu Duan Bultenon.

AKCEPTOJ: La mondkonata bierfarejo TUBORG invitas la kongresanojn al vizito en la fabriko.

GRAFIKISTOJ kaj TIPOGRAFIKISTOJ estas invitataj de la plej granda kaj moderna presejo en Danlando, GUTENBERGHUS, al fakvizito. Oni nepre anoncu sin al la Kongreso antaŭ la 30-a de junio 1956.

STATISTIKO: (ĝis fino de marto): Algerio 2, Argentino 1, Aŭstralio 5, Aŭstrujo 11, Belgujo 6, Brazilo 2, Britujo 140, Bulgarujo 2, Ĉeĥoslovakujo 2, Danlando 283, Finnlando 77, Francujo 136, Germanujo 125, Grekujo 1, Hispanujo 11, Islando 22, Izraelo 2, Italujo 113, Jugoslavio 79, Kanariaj Insuloj 1, Kanado 2, Kongo Belga 2, Maroko 15, Meksikio 1, Nederlando 74, Norda Rodezio 1, Norvegujo 83, Novzelando 1, Portugalujo 2, Svedujo 303, Svisujo 23, Turkujo 2, Usono 10, Venezuelo 1.

Sumo: 1541 el 34 landoj (pasintjare 1141 el 29 landoj).

Gian Carlo Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario

entute ĉ. 6 milionoj da dolaroj. La franca registaro donis seninterezan prunton, repagotan en 30 jaroj. La konstrumaterialo estis mendita de 11 francaj entreprenoj, kiel ankaŭ de entreprenoj en Italujo, Svislando, Belgujo kaj Britujo.

Muzeo kun homaj restaĵoj de antaŭ pli ol 100.000 jaroj

Fragmentoj de potoj uzitaj de la Neandertala homo antaŭ ĉ. 100.000 jaroj, same kiel liaj armiloj kaj ostoj de leonoj kaj elefantoj, kiujn li ĉasis, troviĝas inter la maloftaj ekspoziciaĵoj montrataj en la Muzeo de Homa Paleontologio, kiu nun estas konstruata proksime de la vilaĝo San Felice

Circeo sur la Itala marbordo norde de Napoli. Tiuj restaĵoj estis malkovritaj de esploristoj en la ĉirkaŭaĵo, precipice en Grotta delle Capre, la Kavoj de Kaprinoj, natura labirinto sur la marbordo kiu enhavis multnombrajn restaĵojn de la antaŭhistoria homo.

En la muzeo estos ankaŭ montrita sur modeloj la evoluo de la tera surfaco dum la periodo, al kiuj apartenas la Neandertalulo kaj liaj posteuloj. Aliaj ekspoziciaĵoj objektoj priskribos la historion de tiu ĉi parto de la Mediteraneo ek de la tempo de la detruo de Trojo, antaŭ 3.000 jaroj, ĝis la hodiaŭa tago.

(Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Informservo).

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schriftelijke cursussen en uitleendienst:
 Mej. A. C. H. van der Beek, P. C. Hooftstr. 90, Amsterdam-Z.
 Penningm.: B. J. J. Albers, Olympiaweg 69^{III}, Amsterdam-Z. Postrek. 34563.
 Adm. Ned. Esp.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O.
 Boekendienst: S. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915,
 Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
 Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
 Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewegstr. 29 Badhoevedorp
 Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.
 Vic-ĉefd. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 822075.

FINANCA RAPORTO L.E.E.N.

31 Decembro 1955

ENSPEZOJ	BUGETO		JARKONTO		BUGETO	
	1955		1955		1956	
Kotizoj	G.	3600.—		3622.12		3500.—
Donacantoj	„	30.—		139.50		140.—
Abonoj	„	125.—		121.55		120.—
Libro Servo	„	250.—		250.—		250.—
Skriba Kurso	„	10.—		23.77		10.—
Rentumo	„	100.—		141.04		100.—
Deficito	„	350.—		466.85		750.—
	G.	4465.—		4764.82		4870.—

ELSPEZOJ

Organo kaj Redaktoro	G.	2100.—		2059.93		2200.—
Kunvenoj ĉefestraro	„	400.—		502.25		900.—
Administra estraro	„	300.—		383.74		350.—
Repago sekciaj delegitoj	„	216.—		216.—		210.—
Kontribuo U.E.A.	„	250.—		250.—		250.—
Ekzamena komitato	„	25.—		24.90		15.—
N.C.K.E.	„	30.—		30.—		30.—
Biblioteko	„	15.—		15.—		15.—
Reprez. Univ. kongreso	„	300.—		300.—		250.—
Ofic. Esp. ĉe la Instr.	„	50.—		50.—		50.—
Salono jarkunveno	„	40.—		40.—		40.—
Distr. ĉefestraranoj	„	15.—		51.44		50.—
Teatra servo	„	5.—		5.—		5.—
Gazetarservo	„	100.—		129.97		125.—
Propagando	„	200.—		193.67		200.—
Diversaĵo	„	69.—		52.25		60.—
Reprezo Stat/katologo	„	350.—		350.—		
Esperantist				110.68		120.—
	G.	4465.—		4764.83		4870.—

BILANCO (31 Decembro 1955)

Poŝtĵirkonto	G.	5060.68	U.E.A.	G.	1692.97
Kaso	„	257.19	Kreditoroj	„	4005.68
Banko	„	345.25	Kotizoj 1956	„	197.75
Sparkonto	„	6018.90	Abonoj 1956	„	24.—
Debitoroj	„	37.20	Donacantoj 1956	„	6.50
			Propaganda kaso	„	826.64
			Kongresa kaso	„	65.28
			Rezervo	„	2547.—
			Kapitalo		
			1-1-55		2320.25
			Defic.		466.85
				„	2353.40
	G.	11719.22		G.	11719.22

B. J. J. Albers

Gen. kasisto

Komunikoj de la Ĉefestraro

La ĝen. kasisto petas la ĝenanojn kaj abonantojn, kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizon/abonmonon por la nuna jaro, fari tion kiel eble plej baldaŭ. Post la 15a de majo la kasisto dissendos poŝtkvitancojn al tiuj, kiuj ankoraŭ ne pagis. Se vi do deziras eviti ekstraajn elspezojn pro la enkasigo, vi nepre pagu antaŭ la 15a de majo per poŝtkonto 34563, de Ned. Esp. Ver. L.E.E.N., Olympiaweg 69^{III}, Amsterdam-Z.

La sekcioj, kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizon estas atentigataj, ke laŭ nia regularo la sekcio ne havos voĉdonrajton en la proksima jarkunveno, se la kotizo, minimume por la unua duonjaro, ne estas pagita.

RAPORTO GAZETARSERVO 1955

Estas mia tasko raporto al vi koncize pri la agoj de la gazetarservo dum 1955. Unue la ciferojn, poste la komentariojn.

En la jaro 1955 mi ekspedis ok-foje bultenon. Ili estis sendataj ne plu nur al la lokaj kunlaborantoj, kiel antaŭe, sed ankaŭ al ĉiuj gazetoj, aperantaj minimume 3 fojojn semajne por plirapidigi la komunikadon. La perantoj ekde tiu ĉi jaro nur prilaboras la malpli ofte aperantajn gazetojn, escepte en kelkaj okazoj, kiam direkta kontakto estas preferinda.

Laŭ mia konstato, en la pasinta jaro aperis en 73 diversaj gazetoj (inkluzive regionajn eldonojn) kaj revuoj entute 205 komunikoj kaj artikoloj pri Esperanto, rekte aŭ flanke.

Tiuj ĉi ciferoj ne estas tre kontentigaj laŭ mia opinio. Kompare al la antaŭa jaro la nombro malpliigis konsiderinde. Ni ne forgesu, ke la Univ. Kongreso tiam ludis grandan rolon en la publiko de nia movado, sed mi tamen kredas, ke la ciferoj povus esti pli altaj.

Pro pluraj faktoj. Unue mi estas certa, ke aperis multe pli da publikaĵoj en la Nederlanda gazetararo. Sed mi ne ricevis la eltondadojn. Se ĉiu kiu estis trovinta en iu gazeto ion pri Esperanto, eltondus ĝin kaj sendus ĝin al nia servo, la nombro estus certe konsiderinde pli granda. La teritorio, en kiu laboras la sekcioj estas multe malpli granda ol Nederlando; pro tio mi petas la helpon ankaŭ de ĉiu ĝenerala membro en tiu direkto. Cetere neniu pensu, ke la najbaro faras la laboron; je tiu ĉi kampo helpu ĉiu! La ciferoj estas de granda valoro precipe por C.E.D. Aliflanke la nombro da komunikoj povus esti pli alta se la lokaj kunlaborantoj kaj sekre-

(Daŭrigo p. 7)

JARRAPORTO

1955 estis nia jubilea jaro pro 25-jara ekzistado. Ni festis ĝin, intime kaj honore al la pioniroj de 1930. Tra la tuta jaro ni interplektis fest-erojn: paketo por ĉiuj niaj gemembroj kun multaj broŝuroj kaj gazetoj; nova interkonsento pri speciala rabato por niaj gemembroj kun la Instituto; eldono de jubilea numero 12-paĝa; transdono de rememorkarto dum la kongreso en Utrecht al la pioniroj. Per tiu interna agado, ni plifirmigis la kontakton inter la gemembroj, sed verŝajne iomete forĝesis la ĝeneralan informadon. La sekcioj envere povis raporti nur pri malgravaj sukcesoj, dum la skriba kurso de la Ligo transiris al nova prizorganto, tiel ke ankaŭ per ĝi ni ne akiris novajn gemembrojn.

Dum la sama jaro forpasis du el la festitaj pioniroj, nome Sano Cognie el Kortrijk, kaj Sano Jan van Schoor el Antwerpen.

FLANDRA ESPERANTISTO :

Aperis 10 fojojn, je eldonkvanto de 500 ekz. redaktita dum la tuta jaro de S-ro D-ro Van Gindertaelen. La kunlaborado inter LEEN, RBLE, SES kaj FL.L.E. ankoraŭ ĉiam ekzistas, kaj funkciis glate.

Kongreso :

Okazis kiel kutime je Pentekosto, sed ĉi-foje organizita de LEEN, sekcio Utrecht. Vere modela kongreso (vidu no de Junio F.E.)

UEA :

En la jarlibro de Universala Esperanto Asocio aperis en 1955, 4 tutpaĝaj reklamoj de turistaj urboj, nome de Antverpeno, Bruĝo, Gent kaj Hoi.

Nia komitato, D-ro Van Gindertaelen, demetis tiun funkcion en aŭgusto de 1955, kaj estis anstataŭata de S-ano Maertens G.

Sekcioj kaj Re prezentantoj :

En Astene nia S-ano Van der Linden organizis ekspozicion kaj poste aranĝis kurson. En Leuven nia estraranino faras tre bonan laboron, tiel ke ni baldaŭ povos rimarki la rezultatojn.

SEKRETARIEJO :

La sekretario forsendis al ĉiu membro paketon kun diversaj Esperanto-broŝuroj kaj gazetoj. Krom tio, li prizorgadis la kutimajn korespondadojn kaj la centran revuo-kason.

KUNVENOJ :

Du jarkunvenoj, nome en Utrecht, dediĉita al la jubilea festo, kaj la 4.12.1955 en Gent. Krome okazis kvar estrarkunvenoj.

G. MAERTENS.

Flandra Ligo Esperantista.

Prezidanto : Gerard Debrouwere, Magdalenstraat 29, Kortrijk.
Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, St.-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).
Kasistino : F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.
Biblioteko : E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)
U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.
Redakcio F.E.: Drs. Fern. Roose, Ste. Klaradreef 59, Brugge.
Koresponda kurso : H. Pirennelaan 25, Gentbrugge.

ESTRARKUNVENO EN GENT

La 7.4.1956 la estraro de nia Ligo kunvenis en Gent kaj priparolis diversajn problemojn, kaj aŭskultis al diversaj raportoj i.a. de S-ro Couwenberg pri UEA — vivado en nia teritorio, de S-ro Roose F. pri lia agado ĉe la Unesco komitato de nia lando (vidu la numeron de F.E. de aprilo, sub la rubriko de FL.L.E.) kaj pri la financa situacio, pritraktita de F-ino Terryn.

Unuanime S-ro Maertens estis elektata definitive kiel komitatano de FL.L.E. en la sino de UEA.

Pri la Beneluksa - kongreso en Gent ni eksciis ke ĝis nun aliĝis 168 geesperantistoj, inter kiuj multaj eksterlandanoj. De FL.L.E. aliĝis ĝis nun 33 liganoj. La sekcioj estas petataj kiel eble plej baldaŭ ensendi la nomon kaj la pagon de la novaliĝintoj, ĉar ni scias pri tiaj grupoj kiuj jam pagis al la loka kaso.

Propono de S-ino Meurrens pri agado ĉe la komitato de la Internacia Ekspozicio de Bruselo 1958 estis akceptata. Sekve de tio la sekretario petos nome de la ligo la alsendon de Esperantlingvaj prospektoj kaj la redaktoro aperigos alvokon por ke la liganoj petu la samon individue.

S-ro Sutterman, kiu dum longaj jaroj prizorgis la Korespondan Kurson de FL.L.E., petis ke iu transprenu tiun taskon. Li laboras ĉe la N.I.R., (ni ĉiutage povas admiri lian voĉon pere de niaj laŭparoliloj), sed pro tio ne plu disponas pri la necesa tempo. Ni esperu ke S-ro Sutterman povos foje elsendigi radio-kurson! Ni dankas lin pro la farita laboro!

Dum la ĝenerala jarkunveno en Gent, S-ro Vandeveldel, A., aktiva sekretario de la tiea sekcio, bonvolis akcepti la transprenon, kaj de post tiam ni metis lian nomon kaj adreson en la kadreto de la Ligo supre de niaj specialaj tekstoj. Sed la estraro planis eluzi tiun transprenon por pli intensive propagandi tiun kurson. Ĝi estas la sola metodo pri kiu la ligo mem disponas por pligrandigi la nombron de la Esperantistoj en nia lando; specialaj kaj necesaj decidoj estis prenitaj por komenci la propagandon ek de la monato aŭgusto.

Esperanto kaj la
Universala Ekspozicio
en Bruselo 1958

ALVOKO

En aprilo-oktobro 1958 okazos en Bruselo granda Universala Ekspozicio, sub la signo de nova humanismo kaj internacia kunlaborado.

La propaganda servo de la Ekspozicio eldonis plurajn broŝurojn en lingvoj franca, angla kaj nederlanda.

Ĉiuj bonvolu skribi al Commissariat Général du Gouvernement, Exposition de Bruxelles 1958, Putterie 28, Bruxelles (Belgujo), por rekomendi uzon de Esperanto kaj ĉiuj Nederland ling — aŭ Francingvanoj bonvolu en Esperanto skribi peti esperantlingvajn informojn pri la Ekspozicio.

Revuoj bonvolu represi tiun ĉi artikolon!

Internacia Esperanto-Muzeo WIEN

Tiu tre interesa instituto, sub gvidada de la meritplena Kortega Konsilisto Hugo Steiner petas al nia Ligo reprezentanton. Ni varme rekomendas tion al unu el niaj gemembroj kiu anoncu sin ĉe nia redaktoro Drs. F. Roose. Li sciigos tiam la kondiĉojn, kiuj estas interesaj.

Anonco

Cu vi vizitos la U-K- en Kopenhago? Kaptu la okazon por havi belan ferion kaj bonan konversasian ekzercon antaŭ la kongreso, kaj partoprenu en la internaciaj feriaj kursoj en Helsingo.

Petu informojn ĉe la karavan-organizanto Y. P. Kingma, Koekoekstraat 8, Leeuwarden.

La Sankta Virgulino kun la Inkujo

Laŭ „Gentianen” (legendaro)



Sub la regado de Ludoviko de Crécy unu el la ĉefaj gentaj burĝanoj estis la viktimo de abomena murdo. Kiam la senviva korpo de la viro estis trovita de la noktgardistoj, preterpasis hazarde helpbuĉisto la saman straton. La gardistoj alparolis lin kaj rimarkis ke li kunportis tranĉilegon. Oni tuj suspektis lin kaj kondukis lin al la Grafa Kastelo. Tie oni pridemandis lin kaj esploris la tranĉilon. Sur la klingo estis sangrestoj. La viro sen sukcese klarigis ke li ĵus gorĝ-tranĉis porkon kaj forgesis purigi la tranĉilon, neniuj volis kredi lin. La viro aperis antaŭ la juĝistaro kiu, malgraŭ lia persista neado de kulpo al la murdo, mortkondamnis lin. Jam la postan tagon oni ekzekutis lin.

Ĉe la kondamnito oni allasis konfesprenanton, kiu insiste rekomendis ke li diru la veron, ĉar nur konfeso de la vero povus senigi lin de la pekoŝarĝo kaj liberigi lian animon de eterna inferpuno. Ree la helpbuĉisto certigis sian senkulpecon. La monaĥo, kiu kompatis lin, sed kiu ne povis helpi, konsolis lin kaj promesis helpon per siaj preĝoj kaj, forlasante lin, konsilis ke li mem preĝu al la Sankta Virgulino. Tiam noktigis en la malhela malliberejo kaj la kulpigito preĝis tiel longe kaj tiel fervore ĝis li pro laceco endormiĝis kaj mirinde sonĝis. La Sankta Virgulino aperis al li kun la Jezu-infano sur la brako. La Di-patrino havis inkujon en la mano kaj la Infaneto tenis anserplumon en siaj manetoj. Li tremis ĝin en la inkujon kaj skribis kelkajn vortojn sur pergamen-peco kaj donante ĝin kiel rulajon al la viro diris al li ke li, ĉe la alveno de la gvardisto, petu paroli kun la urbjuĝisto. Kiam oni permesos la interparoladon, la helpbuĉisto devos transdoni la skribajon al la juĝisto.

Malĝoje vekigante la viro pensis ke sonĝado estas trompado. Sed li mirigis kiam li rimarkis je sia flanko la rulajon el sia sonĝo. Li malvolvis ĝin kaj vidis grandajn orajn literojn. Ne scipovante legi, li tamen komprenis ke ĉi-tio estis ĉiela mesaĝo. Li zorge formetis la rulajon ĉe sia brusto kaj atendante ke la gvardisto kondukos lin al la ekzekuto li preĝis al Dio kaj al la Sankta Patrino por danki ilin pro la miraklo, kiu al li okazis.

Tiam li faris tion kion la Jezu-Infano al li ordonis kaj tuj, post kiam la juĝisto legis la sciigon de la pergameno, li ordonis la senprokrastan liberigon de la viro.

Ĉiuj povas imagi al si la surprizon kaj la ĝojon de la buĉist-helpanto kaj komprenos ke la viro farigis, kiel dankesprimon, bildon de la Virgulino kun la inkujo kaj lokigis ĝin en la apudeco de la Grafa Kastelo.

Pli poste, kun la sama dankesprimon, la gildo de la buĉistoj translokigis la bildon en fasad-niĉon de la Granda Viandejo, kie ĝi ankoraŭ estas videbla (tre proksime de la ponto).

BIBLIOGRAFIO

Adam MICKIEWICZ: *SINJORO TADEO* aŭ la lasta armita posedopreno en Litvo. Nobelara historio de la jaroj 1811 kaj 1812 en 12 libroj verse tradukitaj de Antoni GRABOWSKI. Dua eldono ĉe eldonejo „POLONIA”, Vassovio 1955. XII + 334 paĝoj. Prezo f 6.— plus sendkostoj. Mendebila ĉe la libroservo de LEEN.

Mirakloj okazas ankoraŭ en la 20-a jarcento. Ĝuste kiam ni, en la okcidenta mondo, parolas pri la neceseco de la reeldono de la plej gravaj klasikaj verkoj de la Esperanta literaturo, oni aperigas „en la oriento” verkon unikan en la mondliteraturo. Efektive unika estas „Sinjoro Tadeo”, ĉar ĝi estas verko klasika por du literaturoj. Unue kiel epopeo de la pola literaturo, verkita de M. (elparolu: Mic-kjević) en la 19-a jarcento kaj prezentanta bildon multflankan pri socio nun forpasinta; due kiel mejloŝtono en la evoluo de la literatura lingvo de Esperanto pro la kuraĝo solvo de la traduktasko, per kiu Antoni Grabowski akiris porĉiaman meriton en Esperantujo.

La fakto, ke ĉi tiun duan eldonon enmondigis oficiala libro-eldonejo de la Pola Respubliko okaze de la centa datreveno de la morto de la poeto estas samtempe rekono pri la meritoj de la tradukinto kaj pri la nuna disvastigiteco de la internacia lingvo, kiu iam modeste aperis en la sama pola lando.

Mickiewicz skribis sian ĉefverkon en modesta ĉambreto de elmigrinto, en Parizo, sopirante al sia amata patrujo, por kies libereco li elokvente kaj energie batalis. Li priskribas ne nur la naturajn belajn de sia fora lando, sed prezentas kalejdoskopon bildaron de homoj kaj ideoj, sopiroj kaj aspiroj el la epoko de arda patriotismo kaj senfina sopirado al nacia kaj socia liberigo, en la komenco de la antaŭa jarcento.

Grabowski verkis sian tradukon ankaŭ en animpremaj cirkonstancoj, en la unua mondmilito, post instigo kaj kuraĝigo de D-ro Zamenhof. Li faris sian laboron „kun granda pietismo por la pola originalo kaj la lingvo Esperanto, penante eble plej fidele transdoni la enhavon kaj ĝian formon”, kiel li skribis en la antaŭparolo al la unua eldono (1918).

Ĉu Mickiewicz povis esperi en 1833/34 ke iam lia patrujo honoros lin kiel unu el siaj plej indaj filoj kaj ke lia verko estos legata ankaŭ en aliaj landoj kaj lia nomo ŝatata kaj respektata ĉie?

Ĉu Grabowski povis esperi ke lia traduko estos akceptita de oficialaj rondoj en Pollando kaj ke la dua eldono ne aperos „kun helpo de Esperantista Rondeto”, kiel la unua, sur papero malbonkvalita, ĉe iu nekonata presejo, sen ilustraĵoj, — sed sur luksa papero, en tola bindo, kun ora stampo kaj titolpaĝo laŭ projekto de granda artisto, ĉe eldonejo ŝtata? Sopire li skribas en la fino de sia antaŭparolo ke li ŝatus prezenti la verkon kun portreto de l' poeto kaj kun ilustraĵoj, ŝajne famaj, de l' pentristo Andriolli. La financoj tion ne permesis. „Eble iam mi prosperos aperigi apartan albumon”, li skribis. Li ne sukcesis realigi tiun planon, ĉar li mortis en 1921. Kaj jen, 35 jarojn poste, ne nur lia nomo ne estas forgesita, ne nur li estas honorata kiel patro de la Esperanta poezio ĝuste pro ĉi tiu traduko, sed ĉi tiu estas honorata ekster la kadroj de la modesta Esperantujo, ĝi akiris oficialan agnoskon kaj estas disvastigata, kun la famaj ilustraĵoj de Andriolli, en la granda mondo, sekve de kunlaboro inter la (oficiala) Komitato por Kulturaj Rilatoj kun la Eksterlando kaj la Asocio de Esperantistoj en Pollando.

El la irado de ĉi tiuj aferoj mi ĉerpas optimismon pri la fina rekono de la meritoj de nia lingvo kaj de nia movado entute.

Pro la oficiala eldono, la libro estas, relative, malmultekosta. Ĝi estas ornamo por ĉiu Esperantista libroŝranko. Kvankam ĝi ne estas verko legebla „sen interrompo”, ĝi estas verko posedinda pro la ena valoro, sed ankaŭ kiel impona propagandilo, ĉar ĝi absolute pravas la valoron de Esperanto kiel perilo de kulturaj valoraj de

popolo al popolo kaj ankaŭ tion, ke la registaroj iom post iom malkovras la simplan veron, ke nia lingvo estas vera lingvo kaj ke ĝi taŭgas por ĉiuspeca uzado, neesceptante altan literaturon.

Ni devas esti dankaj al la oficialaj instancoj, kiuj decidis la reeldonon, sed samtempe ni rajtas esprimi nian bedaŭron, ke oni ne represis la tutan tekston de la antaŭparolo de la unua eldono, en kiu Grabowski donis valorajn informojn pri la genia aŭtoro, pri la tiama politika situacio en Polujo kaj pri la verko mem, por helpi la aliandajn legantojn al pli bona kompreno kaj pli ĝusta aprezo.

S. PRAGANO.

(daŭrigo de p. 4)

tarioj montrus pli grandan aktivecon eksteren. Oni kaptu ĉiun okazon rapti en la gazetaro: pri kontakt-kunvenoj, kurso, kursfino, Zamenhof-vespero, specialaj jubileoj kaj aliaj aranĝoj de la loka movado, tamen evitante tro propagandan tendencon. Mi havas bonajn rilatojn kun kelkaj sekcioj pro la eltondadoj, sed kiuj tamen tute neglektas la propran publicon. Mi aldonas ke mi volonte donos konsilojn je tiu ĉi kampo de nia laboro.

Fine mi mem ne povis esti sufiĉe aktiva dum la pasinta jaro pro privataj cirkonstancoj. Sed mi havas bonan esperon pri plibonigo de la situacio en 1956.

Ĉiujn, kiuj kunlaboris en 1955 en la Gazetarservo per sendado de eltondadoj aŭ verkado de komunikoj, mi dankas kore kaj mi esperas, ke niaj rilatoj ankoraŭ plifortiĝos en la nova jaro. Precipe mi dankas S-ron H. L. Fagel, kiu tiel enimente priorgis la statistikan fakon de la servo.

Jac. Blokker

Trilanda Renkontiĝo en Kolonjo Ora Jubileo

(31-an de marto—2-a de aprilo)

Okaze de la ora jubileo pro 50-jara ekzisto de la Kolonja Esperanto-grupo, sekcio de la Germana Esperanto Asocio, la kutima trilanda renkontiĝo inter germanaj, belgaj kaj nederlandaj geesperantistoj estis aranĝita ankaŭ en Kolonjo kaj same la jarkunveno de la Rejnlanda Vestfalia Esperanto-Ligo (Revelo) la 31-an de marto ĝis la 2-a de aprilo 1956.

La aktiva sekretariino de nia sekcio en Treebeek, F.ino Nemeth, sendis al ni longan raporton, kiun ni devis iom mallongigi pro spacomanko.

La gazeto „Kölnische Rundschau” publikigis en sia numero de la 3-a de aprilo longan artikolon pri ĉi tiu renkontiĝo. Entute ĉeestis pli ol tricent partoprenintoj inter kiuj sepdek ekster-

JARRAPORTO 1955 de la Radio-Servo N.C.K.E.

La Radio-Servo de la N.C.K.E. en la 1955-a jaro regule daŭrigis sian laboron konsistantan el la kompilado de la listoj de Esperanto-radio-dissendoj — en la nederlanda lingvo por la radio-programaroj kaj en Esperanto por la organoj de la Esperanto-organizo aliĝintaj al N.C.K.E. — kaj dissendo de tiuj listoj al la redakcioj de la nomitaj gazetoj.

Ciudusemajne ni sendis la liston por 2 semajnoj al la redakcioj de „De Radiogids” (VARA), „Vrije Geluiden” (VPRO), „De Radiobode” (AVRO), „Katholieke Radiogids” (KRO) kaj „Omroepgids” (NCRV), kies adresojn ni menciis en la jarraporto de 1954-a. La unuaj tri programaroj regule aperigis niajn informojn en specialaj okulftrapaj anguletoj ĉe la programoj de la koncerna tago. Ekzemplo imitinda — ankaŭ eksterlande.

Laŭ peto de gelegantoj de unu el la programaroj ni mencias en la listoj ne nur la ondlongojn, sed ankaŭ la frekvencojn.

KRO kaj VARA regule disaŭdigis siajn novaĵojn en Esperanto respektive ĉiusabate kaj ĉiumerkrede; NCRV dissendis prelegon en Esperanto pri „La Evangelio en Esperanto” en muzika kadro la unuan lundon de ĉiu monato; VPRO dissendis ambaŭ kristnasktagojn matene kristnaskan saluton ne nur en 4 naciaj lingvoj, sed ankaŭ en Esperanto por la unua, sed certe ne por la lasta fojo laŭ letero ricevita de la programestro de VPRO.

De tempo al tempo, kiam estas gravaj ŝanĝoj en la listo, ni kompilis nian radiatorubrikon „Verdlandon Vokas”, kiun ni sendis al la redakcioj de la gazetoj:

landaj gastoj. Eĉ kelkaj brazilaj esperantistoj, kiuj hazarde estis en Parizo, farante vojaĝon tra Eŭropo venis speciale al Kolonjo por partopreni la renkontiĝon kaj la feston pro la ora jubileo de la kolonja grupo.

D-ro Herrmann, prezidanto de la G. E.A. menciis en sia salutparolado la grandajn meritojn de la jubileanta sekcio, kiu ne nur estas unu el la plej malnovaj grupoj de la landa asocio sed ankaŭ faris kaj faras tre multe por la disvastigo de nia lingvo Esperanto. La programo de la aranĝoj estis tre alloga kun muzikaj, teatraj, prelegoj, kantado, deklamado k.t.p.

La tuto estis vere inda manifestacio pri la vivanteco de nia lingvo kaj ni kore gratulas la aranĝintojn pro la brila sukceso, kiun ili akiris.

La venonta trilanda renkontiĝo okazos la 7-an kaj 8-an de julio en Verriers.

„Nederlanda Esperantisto”, Zwolseweg „172 A, Diepenveen;

„Laborista Esperantisto”, Admiralen „gracht 214, Amsterdam W.;

„Espero Katolika”, Kasperpad 91, „Dordrecht;

„La Juna Vivo” (TEJO), Overtoom „435/II, Amsterdam W.;

„Dia Regno”, Karel Doormanlaan 24, „Uithoorn (N.H.);

„Irlanda Blindulgazeto”, red. s-ro J. „P. Neary, 8 North Great Georges „Street, Dublin (Irlando).

Laŭbezone ni intersanĝis informojn kun s-ro Georges Larglantier, 29 Bd Murat, Parizo 16, estro de la Radio-Servo U.E.A. Laŭ lia instigo aŭ rekomendo la redakcio de „Esperanto”, organo de U.E.A., petis nin verki artikoletojn pri la Esperanto-radio-dissendoj. En 1955-a jam aperis 3 „Radiobabiloj”. En la februara n-ro de 1956-a aperos la 4-a k.t.p. Ni ricevis reagojn el pluraj landoj, eĉ el Israelo.

Ni turnis nin al la Nederlanda Radio-Unio (NRU) por peti:

- a: okazigi Esperanto-radio-kurson en la komuna programo;
- b: disaŭdigi la Esperanto-kantaton „El la Vivo de Zamenhof” (teksto de prof. d-ro Edmond Privat; muziko de Frieso Moolenaar) la 15-an de decembro 1955-a en la komuna programo.

Respondo pri a: NRU ne povas komenci dissendi Esp.-lecionojn, ĉar tiukaze venus petoj dissendi lecionojn ankaŭ pri aliaj lingvoj; la anglalingvaj okazas por nederlandaj geelmigrontoj.

Respondo pri b venis de la estro de la Muzik-Servo de VARA, kiu pripensas dissendon de tiu kantato 14/IV aŭ 15/XII/1956-a. Li petis alsendon de la partituroj, kiujn la komponinto jam havigis al li laŭ niaj peto kaj instigi.

La akcepto de la karavano el 45 geanoj de la Esperanto-radio-kurso de s-ro P. Delaire el Orléans okazis en 1955-a ne en Frislando, por kio ni faris multajn klopodojn, sed en Krommenie. Ĝi bone sukcesis kaj propagande efikis.

En 1955-a la Radio-Servo dissendis 202 poŝtaĵojn kaj elspezis pro afrankoj k.t.p. f 23,88 laŭ ĉi-kunaj fakturoj.

(S. S. de JONG Dzn.),
estro Radio-Servo NCKE.

RAPORTO KOMISIONO LIBROSERVO

Ĉu likvidigo de niaj libroservoj?

La jarkunveno en Utrecht dum la pentekosta kunsido en 1955 instalas komisionon kun la tasko esplori ĉu la propono de la sekcio Groningen pri la transmeto de la vendado de Esperanto-libroj el la Esperanto rondo al la publika vendado en la ordinaraj butikoj de librovendistoj estas akceptinda. Membroj de tiu komisiono estis S.ino L. de Vries-Kanning el Groningen, S.ro G. J. Degenkamp el Amsterdam kaj S.ro H. J. Blokker el Heemstede.

Sin prezentis la jenaj demandoj:

1. Ĉu la librovendistoj volas kaj povas transpreni tiun taskon?
2. Ĉu la transdono influos la vendprezon de la libroj?
3. Ĉu la Esperantistoj povas facile kaj rapide akiri menditajn librojn?
4. Ĉu la Esperanto-unuigoj povas malhavi la profiton de la libroservoj?

Antaŭ ĉio ni konstata ke la situacio diferencas laŭ la kategorio kaj deveno de la vendotaj libroj, kiujn ni dividu jene:

- a. libroj, eldonitaj ĉe profesiaj nederlandaj eldonistoj! (ekz. Meulenhoff, Muusses, Thieme).
- b. libroj de hazardaj nederlandaj eldonintoj.
- c. libroj, eldonitaj en la eksterlando.

I. La librojn sub *a* volas kaj povas vendi ĉiu librovendisto. Lia gajno estas normala kaj en la gvidlibro de la butikisto la eldonisto estas trovebla. La prezo restas egala por la aĉetanto. En la mezuro ke la ne-esperantista publiko volas eklerni Esperanton, ekzemple per kursoj en la lernejoj, la nombro de tiaj vendoj aŭtomate kreskos.

La kategorio *b* liveras malfacilaĵojn por la butikisto, ĉar li ne povas trovi la adreson de la eldoninto en sia gvidilo. Krome la butikistoj ne ŝatas mendi ĉe hazardaj eldonantoj, ĉar ilia organizado rekonas nur tiujn, kiuj estas organizitaj en la eldonista societo.

La kategorio *c* donas plej multe da malfacilaĵoj. Unue ĉar la butikistoj ne scias kie akiri tiajn librojn, due pro la lingvaj malfacilaĵoj. Ni sciu ke la nederlanda butikisto ankaŭ ne aĉetas aliajn eksterlandajn librojn rekte ĉe la eldonisto, sed ĉe importisto. Tiuj importistoj, kiuj kutime limigas sin al kelkaj landoj posedas la dikajn gvidilojn por tiuj landoj, havas regulajn rilatojn kun la grandaj eksterlandaj eldonistoj kaj eksportistoj, povas aĉeti grandkvante kaj ŝparas afrankon pro kombinitaj sendaĵoj.

II. Niaj libroservoj fakte faras la laboron de la importistoj, sed vendas rekte al la esperantistoj. Tio klarigas kial la esperantaĵoj el la eksterlando (kaj tio estas la pli granda parto de la vendokvanto) estas relative malmultekostaj. Vendado pere de importistoj kaj librovendistoj certe plialtigus la prezojn de la Esperanto-libroj se tiu procedo estus ebla.

III. La transpreno de la vendado fare de la librovendistoj havas propagandan valoron nur, se en la butikoj troviĝas tiel riĉa stoko ke la neesperantista publiko povas rimarki niajn librojn inter la amaso da aliaj kaj se la vendebleco estas tiel alta ke la butikistoj decidas ofte uzi la limigitan spacon en siaj montrofenestroj por ekspozicii niajn verkojn. La sperto en la estinteco evidentigis ke la librovendistoj, kiuj prenas la riskon de sufiĉa stoko, vendis nur malmulte kaj perdis monon. Ĉiuj ĉesigis post kelkaj jaroj la vendadon, ankaŭ en la tempo kiam ankoraŭ ne ekzistis libro-servoj kaj kvankam ĉiuj esperantistoj en la loĝurbo de la librovendisto tiutempe faris siajn aĉetojn en lia butikoj. Tia fiasko ŝajnas al ni malpropagando. La situacio, kiu havas veran propagandan valoron, nome ke en ĉiuj librotutikoj kaj kioskoj kuŝas esperantaĵoj, estas en la nuna tempo tute nebla, ĉar por tiu celo la venda kvanto de niaj verkoj devus almenaŭ milobliĝi.

IV. La fakto ke la esperantistoj nuntempe plejparte mendas siajn librojn ĉe kvino da libroservoj, donas al tiuj libroservoj la okazon teni stokon, kondiĉi favoran rabaton kaj liveri en kelkaj tagoj ankaŭ tiujn librojn, kiuj devas veni el la eksterlando. Eĉ se la librovendistoj scius la vojon kaj se ne ekzistis lingvaj malfacilaĵoj, la livero de simpla libro ofte postulus monatojn.

Se oni dividus la suman vendon de ĉiuj libroservoj en Nederlando inter 800 librovendistoj en nia lando, la poa kvanto estus ridinde malalta.

V. Kelkaj Esperanto-societoj en Nederlando egaligas sian konton per la profito de la libroservo. Malhavo de tiu profito signifus plialtigon de la kotizoj.

KONKLUDO:

La komisiono devas malkonsili akcepton de la groningena propono.

Dua Konkludo:

La esperantistoj aĉetas hontinde malmultajn librojn. Tio kaŭzas ke ne nur la profesia vendado, sed ankaŭ la eldono de Esperantaĵoj estas riska entrepreno.

Tial Esperanto-aŭtoroj povas malfacile trovi eldonistojn kaj la eldono mankodeve okazas private aŭ ĉe neoficialaj eldonantoj.

Aldona sciigo:

Sekcio Groningen akordiĝas kun supra raporto kaj retiras la proponon

NEKROLOGO

La 4-an de marto 1956 dronis S.ino C. J. Belinfante-Hoyer naĝante en la maro en Nova Gvineo. Si estis 42-jara kaj fervora esperantistino.

Unue membrino de nia sekcio en Hago, ŝi poste iris al Amsterdamo, akiris la B-diplomon, estis dum kelka tempo helpantino de S.ro Jung kaj poste iris kun sia edzo S.ro mag. E. V. F. Belinfante, frato de prof. d.ro F. J. Belinfante en Lafayette (Usono) al Nova Gvineo.

Ni volas ĉi tie esprimi niajn korajn kondolencojn al ŝia edzo kaj parencoj.

Naskiĝo

Al Ges. W. Koopmans, Vosmaerlaan 3, Hilversum, naskiĝis filino, kies nomo estas Hendrika Wilhelmina Felicia.

Ni kore gratulas ges. Koopmans.

KORESPONDADO

S.ino Jeannine Le Goff, Avenue de Gaulle, LES ANDELYS (Eure) Francujo, tre deziras ricevi adresojn de gejunuloj nederlandaj, 16-20 jaraĵoj kiuj volas korespondi kun samaĝuloj.

Al Bolonjo en Italio

14 Taga Aŭtobusvojaĝo

La Philips Esperanto Klubo organizos denove vojaĝon al la konata urbo Bolonjo dum la 22a de julio ĝ/k la 4a de aŭgusto 1956. La vojaĝsumo estas F. 113,50 p.p. inkl. de tranoktoj kun matenmanĝoj en belega vilao (Italio) kaj hotelo aŭ privatuloj (Tirol) kaj adm.kostoj. Tagmanĝojn oni libere povos mendi je ĉiu dezirata momento. Kostoj: F. 1,55 (Italio) F. 1,75 (Tirol) por simpla sed bona tagmanĝo. Informojn ĉe S.ro J. Mois, Zonneroosstr. 10, Eindhoven. Tel. 63577 (vespere post 6.30).